


IVAN MAJURANIĆ

L
A
M
O
R
T
O
D
E



SMAIL-AGAO
ĆENGIĆ

IVAN MAJURANIĆ

**LA MORTO
DE
SMAIL-AGAO ĈENGIĆ**

EL LA DOKUMENTITA KAJ KRITIKE
ESPLORITA ELDONO TRADUKIS
JOSIP VELEBIT

ELDONIS: KROATIA ESPERANTO-LIGO
ZAGREB, 1972.

LA TITOLO DE LA ORIGINALO:
IVAN MAŽURANIĆ, SMRT SMAIL-AGE ČENGIĆA

RECENZIS: AKADEMIANO IVO ROTKVIĆ

PRESEJO »PLAMEN«, SLAVONSKI BROD
Skanis kaj elektronike aranĝis: Stanko Rukelj, 2010. j.

PRI LA AŬTORO KAJ LIA VERKO

La kroata popolo, dum sia miljara ekzisto sur la balkana teritorio, daŭre devis kontraŭstari al multaj malamikoj kaj defendi sian vivon. Inter kelkaj, por la popola vivo gravaj eventoj, en longa tempoperiodo, decida estis tiu en la 11-a jarcento, kiam kroatoj ĉesis surtronigi siajn proprajn reĝojn, kaj multe pli poste, en la j. 1790/91, kiam la kroata parlamento, pro la streĉa situacio en la rilatoj inter Kroatio kaj Hungarlando, sub la habsburga dinastio, provizore permesis la limigon de iuj fundamentaj elementoj de l'kroataj ŝtataj leĝrajtoj.

Ilia revivigon, sub tute aliaj kondiĉoj, realigis la kroata nacia movado, konata sub la nomo »ilira movado«, aŭ »kroata popola renaskiĝo«. La movadon prezentis grupo de junaj intelektuloj, kiujn gvidis Ljudevit Gaj. Tiu lerta kaj kapabla juristo sukcesis realigi la eldonon de la kroatlingva ĵurnalo, kaj baldaŭ ricevis multajn kunlaborantojn kaj adeptojn, inter kiuj videble elstaras la poeta figuro de Petar Preradoviĉ (1818—1877) kaj Ivan Maĵuraniĉ (1814—1890), aŭtoro de la eposo »La morto de Smail-aga Ĉengiĉ«.

La poeto devenas el Novi, en la kroata marborlando, kien translokiĝis liaj prauloj, en la 16-a jarcento, el la sudaj regionoj. La viroj de tiu ĉi familio akiris la famon kiel defendantoj kontraŭ la malamikaj atakoj de sur la maro kaj interne de la lando. Post la gimnaziaj studoj en Rijeka li studas la filozofion en Zagreb kaj Szombathely, kie li ekscias pri la ilira movado kaj baldaŭ iĝas konstanta kunlaboranto de ĝia ĵurnalo. En Zagreb li finas la juran studon kaj unue laboras kiel suplento en la zagreba gimnazio kaj poste kiel advokato

en la proksima urbo Karlovac. En la j. 1848, kiam oni ĉesigis la feŭdalismon, Maĵuraniĉ iĝis popola deputato, kaj en la j. 1873, post brilaj sukcesoj en la kariero, li ekestas kroata banuso, kiel unua banuso popoldevena. Dum sia sepjara regado li multon faris por la progresigo de la klereco kaj por la organizo de la ŝtata administracio en Kroatio.

Maĵuraniĉ estis konata kiel tre klera homo, kiu krom juro okupiĝis pri matematiko, filozofio kaj astronomio.

Ankoraŭ kiel gimnaziano, li skribis versojn en la stilo de monaĥo Kaĉiĉ, kiu la plej gravajn eventojn prezentis en la popola deksilaba verso, kaj lia libro iĝis hejma popollegaĵo en la tuta marbordo kaj en la regionoj proksimaj al la maro.

En la momento kiam Maĵuraniĉ aperigas sian eposon (1846), la turka potenco ankoraŭ daŭras en la orientaj regionoj de Balkano, en Bosnio kaj Hercegovino, Serbio kaj Montenegro.

La lasta motivo, kiu instigis lin verki la eposon, estis la okazaĵo en la j. 1840, kiam en la apudlima batalo, inter la turka kaj montenegra rotoj, pereis Smail-agao Ĉengiĉ, konata malamiko de montenegranoj. Tiu ĉi batalo estis por la poeto grava evento, ĉar li kredis, ke per ĝi komenciĝas la agonio de la turka despotismo, kio al la sudslavaj popoloj ebligis, fine, akiri la deziratan liberecon.

Tridek ok jarojn poste, Maĵuraniĉ fakte ĝisvivis la evakuon de la turkaj militistaj fortoj el Bosnio kaj Hercegovino kaj la rekonon de la aŭtonomio al Montenegro.

Sed estis ankoraŭ unu fakto, kiu inkube premis la menson kaj la koron de la poeto: la indiferenteco de la okcidenta Eŭropo por la nenormala situacio sur Balkano. Neniu zorgis pri la popoloj, kiuj per siaj sangaj oferoj, retenante la turkan soldataron dum kvar jarcentoj, savadis la sendependon de l'eŭropaj landoj, ebligante al ili relative trankvilan vivon. Jen, la versoj, kiuj malgraŭ sia forta sugestiveco ne sukcesis rompi la flegmon kaj malatenton de la Okcidento:

»Ho se l' popoloj de ĉi mondo vidus
El ebenajoj, kie vid' perfidas,
Ĉi krucon, kiu, sen malvenk', sur Lovĉen

En alton sin etendas, kaj se ili
Imagi povus, kiel turka monstro,
Penante ĝin per granda faŭk' engluti,
La dentojn vane rompas sur ĉi rokoj,
Ili ne starus manojn kruciginte,
Dum vi pro kruc' suferas, nek malinde
Barbar' vin nomus tiuj, kiuj dormis,
Dum vi por kruc' la vivon oferdonis!«

La verko, malgraŭ sia aktuala temo kaj aparta artisma kvalito, restas preskaŭ nerimarkita ekster la limoj de Balkano. La ironio de la sorto volis, kaj oni iun mezvaloran poemon pri la sama temo agnoskis kaj publikigis kiel valoran artaĵon.

La eposo konsistas el kvin kantoj. La kvar unuaj per sugestaj bildoj pentras la persekuton de la kristanoj, la preparajn paŝojn por la finkalkulo kun la popolpremanto, kiu okazis baldaŭ post la ekmarŝo de la malgranda roto, kaj la krue-lajojn de la turka estro kaj liaj helpantoj post la sensukcesa haraĉkolektado. La kvina kanto per la simbolaj bildoj montras la neeviteblan finon de ĉiu tiraneco.

La plurjarcenta ĉeesto de la turka soldataro sur Balkano per si mem ŝupozigas la fakton, ke la poeto Smail-agaon, sian protagoniston en la verko, konsideris nur simbola figuro, per kiu li sugestas al la leganto imagi al si sufiĉe grandan nombron de l' turkaj soldatestroj, kiuj »pro la gloro de la turka imperio« dum longaj jarcentoj turmentis kaj ne malofte masakris la kristanan rajahon sur la sufiĉe vaste regata balkana teritorio. Finfine, laŭ la historiaj faktoj, Smail-agao mem ne estis tiel kruela al siaj kristanaj venkitoj.

La eposo, laŭ la opinio de l' plej fidindaj literaturaj kritikistoj kaj fakuloj, prezentas unu el la plej gravaj beletraj realigoj de la kroata literaturo meze de la 19-a jarcento, kaj unu el la plej elstaraj epoj en la hodiaŭaj jugoslaviaj literaturoj. Kaj tiel altan prijuĝon la verko akiris pro la fakto, ke la poeto, dank' al siaj larĝaj artistaj konceptoj, feliĉe sukcesis kunligi kaj interpacigi kelkajn influojn: tiujn de la klasika kaj tiama itala literaturoj, de la dubrovnika poeto Ivan Gunduliĉ (1589—1638), kaj la influon ek de la infaneco konata inspirodona popola poezio.

Por la verkista kreoplano apartsignifa estis lia studo de ia poezio de Ivan Gunduliĉ. Oficiale invitita de »Matica ilira« kompletigi la eposon »Osmano« de Gunduliĉ, en kies verko mankis du kantoj, kio por ĉiam restis nesolvita enigmo, Maĵuraniĉ havis la okazon konvinkiĝi pri la riĉa lingvotrezoro, kiun prezentis la dubrovnika (dalmatia) varianto de la sama lingvo, kiun li parolis. Tiu konvinko estis decida: la eposo estas kreita en la sinteza lingvo, farita el la literaturlingvoj de la nordo kaj sudo, aŭ pli klare, el la tiam uzataj lingvoj en la literaturaj centroj de Dubrovnik kaj Zagreb, refreŝigita ankoraŭ per la ritmo kaj esprimĉarmoj de la popolkanto. Nu, kompreneble, ĉiuj ĉi spertoj kaj kulturaj atingoj de la poeto ne farus la verkon unuaranga artaĵo sen lia verkista kapablo kunfandi kaj akordigi tutan tiun riĉan heredaĵon, kiun li prezentis en la verko. Nur la miriga artista magio povis krei tiel sonorajn kaj esprimriĉajn versartaĵojn, en kiu specifajn kolornuancojn faras la turkismoj, kiuj sentigas la lingvon de la vastaj regionoj regataj tiam de turkoj, kaj kie ili ankaŭ hodiaŭ ne perdiĝis.

La homama, meditema kaj ne tre parolema naturo de la poeto, tiujn siajn ecojn montras ankaŭ en la verko. La pezan tragedion de la rajaho li detale pentras tie, kun sincera kunsento kiel artisto kaj homo, kiu samtempe treege suferas pro la fakto, ke la homon, tiun cerbe plej evoluantan estaĵon sur la Tero, tamen tiom karakterizas la praavideco, kun kiu li prirabas ĉiujn ĝiajn materiajn bonaĵojn, kaj fariĝas sangavida sovaĝulo al sia kunfrato, nenian instruon profitante de la naturo, en kiu speguliĝas mirinda dia zorgo pri ĉio viva:

De Dio al birdoj, jen, ĉiel donitas,
Trunkkavoj pacaj, nestoj laŭ deziro;
Al fiŝoj akvo kaj la vasta maro,
La vitra domo por vastiĝi dise;
Al sovaĝbestoj je dispono estas
Herbejoj, montoj, grotoj kaj arbaroj;
Kaj al rajaho eĉ pankrust' ne restas
Sekega por moligi ĝin per larmoj.
Sed ĉu mi pravas? La ĉiel' havigis,
Nur turko ĉion al si alproprigis.

Smail-agaon Maĵuraniĉ karakterizas lakone, per kelkaj vortoj, kaj zorgas resti justa, kiam priskribas liajn militistajn ecojn: la agao estas kuraĝa, ne toleras timulojn en sia medio kaj pro tio mortpunas la maljunan turkon, kiu al li rekomendis liberigi la kaptitajn montenegranojn, kiuj, laŭ lia opinio, sendube klopodos venĝi la rajahon. Li priridas ankaŭ sian vojevodon Baŭkon, kiel malkuraĝan kaj mallertan militiston. Smail-agaao revas eĉ pri la postmorta gloro kaj timas la guzlon kaj la popolkanton, ĉar ili povus difsamigi liajn malsukcesojn en la haraĉkolektado kaj perarmilaj ekzercoj. La fakto, ke li konas la magian povon de la menciitaj popoloj informiloj, malkaŝas lian devenon: Ĉengiĉ, kaj same tiel Baŭko, estas islamaniĝitaj slavoĵ. Tiu fakto permesas ankaŭ aliajn konkludojn ne nur pri Ĉengiĉ kiel militisto kaj homo, sed ankaŭ pri la stranga ludo de la sorto kun la homaj vivoj sur la malpaca balkana tero.

La eposo estas publikita en centoj da eldonoj kaj tradukita en 38 lingvojn; inter la du lastaj militoj aperis ankaŭ la Esperanta traduko de Mavro Ŝpicer (1933). La beletra kritikisto kaj verkisto prof. Ivo Frangeš akcentas la fakton, ke »La morto de Smail-agaao Ĉengiĉ« estas unu el la plej ŝatataj temoj de la relative juna kroata kaj monda slavistikoj. »Oni povus verki — li diras — eĉ la historion de la kroata literaturscienco konsidere la prijuĝon de la kritiko kaj la esplorado de la verko de Maĵuraniĉ«.

La poeto en sia eposo uzis la ok- kaj deksilabajn versojn, kiuj en la tradukaĵo estas plilarĝigitaj je unu silabo. Rilate la rimojn li malofte uzis ilin, ĉar la apliko de l' asonancoj estas ĉe li pli ofta. La tradukaĵo spegulas la saman uzmanieron. La larĝa ebleco konsideri certan songrupon jen unu, jen dusi-laba, kion permesas la specifa konsisto de la vortoj en tiu ĉi slava lingvo, same kiel la uzo de multaj sinicezoj, helpis al la verkisto eviti la monotonecon de la striktaj ok- kaj deksilabaj versoj de la popolkanto.

J. V.

VORTKLARIGOJ KAJ NOTOJ

Ĉi-sube ni klarigas ĉefe la proprajn nomojn, la turkajn kaj la aliajn vortojn, kiuj ne troviĝas en la Plena Vortaro, nek en la Grand Dictionnaire Esperanto Francais de G. Waringhien. Pri la turkismoj atentigas la mallongigo (t). Ili estas notitaj laŭ la formo uzata en la verko. Same tiel ni klarigas la unuopajn esprimojn kaj frazojn, kies klarigoj ŝajnas al ni necesaj. Aliaj mallongigoj: mit. (mitologio); reg. (religio).

aman (t) 104	vekrio: helpo!
antaŭ malsata mus'	
elmonta 15	antaŭ la montenegroj
arslano (t) 56	leono
babo (t) 181	patro
balĉako (t) 901	tenilo de sabro aŭ glavo (spado)
batalil' sespinta 811	batalbastono kun ses akraj najloj, pintoj
Baŭko 737	vojevodo, alie nehistoria persono, kiu ne partoprenis ĉe la pereigo de Smail-agao Ĉengiĉ
Cetinje 162	urbo en Montenegro
Cuce, 152	Bjelice, Bjelopavliĉi, gentoj montenegraj
ĉalmo (t) 728	tola volvaĵo ĉirkaŭ la fezo
ĉato (t) 777	skribisto
Ĉekliĉi 154	vilaĝo kaj gento samnoma en Montenegro

damaskaj sabroj 794

delio (t) 167

Durako 8

Durmitoro 175

duŝeko (t) 781

Erinioj (mit.) 990

fajra diablaĵo 742

falakoj (t) 484

fiŝeko (t) 293

grasaj bovoj 21

ĝelato (t) 22

ĝilito (t) 512

ĝogato (t) 975

haraĉo (t) 488

harbo (t) 515

hazur (t) 773

Hektoro 565

hercego 3

hundo gratu ĝian

panjon 651

kurbaj sabroj el ŝtalo for-
ĝitaj en Damasko

heroo, forta viro, aŭ armita
militanto

turka nomo, ĉi tie uzita laŭ
la persono el la eposo »Os-
mano« de la poeto I. Gun-
duliĉ

monto en Montenegro

kuseno

diinoj de venĝo laŭ la greka
mito; en la verko: kolerego,
furiozo

forta, arda brando

ŝtipoj por fiksi la hompie-
dojn ĉe la vipado

kartoĉo, ŝargaĵo, pafaĵo

bovoj, kiuj tiris la vikti-
mojn, sur la pintigitajn pa-
lisojn

ekzekutisto

lanco sen fera pinto

blankhara ĉevalo

hungare: haracs, bulgare:
haraĉ; kapimposto

lanco

estu preta(j)!

greka heroo, filo de Priamo
kaj Hekuba; lin mortigis A-
kilo kaj lian kadavron, ligi-
tan al batalveturilo, ligi-
tan al batalveturilo, trenis
ĉirkaŭ Trojo, ĝis la patro
ne ellaĉetis ĝin

hungare: herczeg, germane:
Herzog; vojvodato

eŭfemismo por la maldeca

blasfemo

ilira movado	la nomon ilira ekuzis Romianoj por la tuta balkana teritorio, sur kiu vivis la ilirgento; poste oni tiun ĉi nomon uzas por la kroata lingvo kaj ofte por la kroata popolo; Napoleono kreis Ilirajn provincojn, dume Austrio el la slovenaj landoj kaj Istrio faras Reĝlandon Iliran; Gaj, kredante tiam, ke la kroata popolo devenas de la iliraj gentoj, tiun ĉi nomon uzas ankaŭ por sia ĵurnalo, sed ĝin ricevas ankaŭ lia tuta movado
iu pri l' pafilflamo zorgas 292	iu zorgas pri fajroŝtono (siliko) de la pafilo
kampo de Gacko 478	pli ĝuste: Gataĉko kampo; la mortfalon de Ĉengiĉ Maĵuraniĉ lokigas sur tiun kampon, en kiu situas la urbo Gacko
kanĝio (t) 588	vipo, skurĝo; kanĝioj trioblaj: trioble plektitaj vipoj, skurĝoj
kavazo (t) 136	la plej fidinda servisto, gardisto, aŭ policisto
Komljani 279	Komani, vilaĝo en Montenegro
Kosovo-kampo 956	rondvalo en Kosovo kaj Me-tohio
kruco(j) 27	moka nomo por la kristana rajaho; la vorto havas ne nur religian, sed same tiel socian, klasan kaj nacian signifojn
kruco kaj profeto 1073	kristano kaj mahometano
kruco tilia 50	moknomo por la kristana rajaho kun la senco: pli malforta ol tiliarbo

kulaŝo (t) 520	ĉevalo cindrohara, flaveska. aŭ musokolora
ankaŭ la man' aŭdaca ekdormetas 525	laŭ la popolkanto, kun la signifo: la mano aŭdaca per- fidas
lando de hercego 3	nomata: Hercegovino; en la 15-a jarcento turka terito- rio, hodiaŭ ĝi kun Bosnio faras unu el la kvin jugo- slaviaj respublikoj
lastjuĝa korno 614	laŭ la kristana kredo okazos la fino de la mondo, kiam la kredantoj per korno estos alvokataj al la Lasta juĝo
Lovĉen 370	la plej alta monto montene- gra
lumeto 532	aŭ lumilo en figura senco: okulo
medet (t) 111	simpla vekrio de turko mor- tanta: helpon!
Mirko 237	princo (en la senco de la germana titolo Furst) de la montenegra gento Drobnjak; lia plena nomo: Mirko Dam- janoviĉ Aleksiĉ (1803-1890), partoprenis en la ekmarŝo kontraŭ Smail-agao Ĉengiĉ
montarano 5	montenegrano
montmusoj 89	moknomo por montenegro- noj
Moraĉa 7	rivero en Montenegro
Mujo 545	Hasano, Omero kaj Jaŝaro, nomoj de servistoj, kiuj ser- vis ĉe Smail-agao
Novica 136	laŭ la historia fakto, Novica (Ceroviĉ) ne estis turko; la poeto prezentas lin filo de Durako por pliprofundigi la motivon de lia ago

punktado eta 75	piko kaŭzita de pinto, kiu al la turko glacie ektuŝis la animon; latine: punctura
rajaho 497	turka-araba vorto, por nomi la nemahometanajn subulojn
rakĉino (t) 147	ruĝa ĉapo
Rizvan-agao 952	ne estas historia persono; ŝajnas, ke Maĵuraniĉ uzis la nomon de Ali-paŝao Rizvan-begoviĉ-Stoĉeviĉ (1761-1851)
Rovci 282	vilaĝo en Montenegro
same rid' eĥas en Hadeso 576	aludo pri la suferoj de pekuloj en la infero (Hadeso, mit.)
saruko (t) 149	vidu: ĉalmo
simito (t) 739	blanka pano
sinio (t) 731	malalta manĝotablo
sofro (t) 733	tablo, sinio
spacon okupas 507	rajaho kulpas al la turka estro jam pro tio, ĉar ĝi vivas, alivorte, ĉar ĝi spacon okupas
Stolac 2	urbeto en Hercegovino
surdaj horoj 231	malfruj noktohoroj,
surda nokto 253	malfrua nokto
ŝtonlando 29	Montenegro
toko (t) 270	metalbutono sur ĉevalo aŭ disketo sur popolkostumo
tondrulo 244	mit. kaj relig.: kiu regas la fulmojn, kiu frapas per ili kaj tondras
topuzo (t) 801	batalbastono
Tusina 175	vilaĝeto en Montenegro
tutuno (t) 893	tabako
vipernesto 145	talio, zono, kie oni portas armilojn
vlaho 11	insulta kaj humiliga nomo por la kristana rajaho en Bosnio kaj Hercegovino
Zagaraĉ 279	vilaĝo en Montenegro

REGADO DE AGAO

*Agao la servistojn vokas
En Stolac, kaŝtelurbo sia,
En bela lando de hercego:
»Alpaŝu, ho servistoj miaj,
La montaranojn elkonduku,
Kaptitojn, kiujn kaptis mi batale
Apud Moraĉa frida akvo.
Same Durakon oldan viron,
Ĉar li fripon' al mi konsilis
Konsenti ilian hejmeniron.
Malcedaj vlahoj estas ili,
Li diris, kiuj certe venĝos
Per mia kap' la vlahajn kapojn:
Kvazaŭ moroza lupo timus
Antaŭ malsata mus' elmonta.«*

10

*Servistoj hastaj ekobeis,
La arestitojn elkondukis.
Katenoj pezaj surpiede,
Kaj ferligiloj sur la manoj.
Vidinte ilin, la agao
Tuj grasajn bovojn akirigis
Kun la ĝelatoj sangaj linkoj,
Kaj turk-donacojn riĉe donis al ili:*

20

*Al ĉiu viro li palison donas,
Al unu ĝin, la ŝnuron al alia,
Por sekva tranĉan sabron kriordonas:
»Ek! krucoj, distribuu nun donace,
Kion mi turko ĵus por vi preparis,
Por vi kaj same por ŝtonlando via:
Ĉar via sorto estos ankaŭ ĝia.«* 30

*Tiel li diris, sed oferi
Vivon por sankta Krist-instruo
Sen tim' konsentas, kiu ĝin defendas.
Kaj nun palis' ekkakis kelkan fojon,
Eksiblis akra sabro kelkan fojon,
Ektremis ankaŭ pendigilo svelta,
Sed buŝ' ne movis sin de l' ar' montgenta,
Nek buŝ' sin movis, nek dentgrinc' eksonis.
Tra vasta kamp' malhela sang' ekfluis,
Nek buŝ' sin movis, nek dentgrinc' eksonis. 40
La vasta kamp' pleniĝis de homkorpoj,
Nek buŝ' sin movis, nek dentgrinc' eksonis.
Sed iu grandan Dion laŭte vokis,
Alia belan nomon de Jezuo,
Kaj facilcore sunon adiaŭis
La batalantoj kutimintaj morti.*

*Tra kampo sangrivero fluas;
La turkoj gapas mankrucinte.
Kun ĝoj' rigardas la pli junaj
Turmentojn sur la kruc' tilia; 50
Sed la pli oldaj ĉi turmentojn
Sur sia haŭt' per vlaha mano
Pro tim' jam anticipe sentas.*

*Vidas l' agao kolerema,
Ke kontraŭ vol' admiri devas*

*Forta arslan' la muson montan.
Ne eblas venĝo kontraŭ kuraĝulo,
Kiu ne timas antaŭ man' venĝema.
La turko murdis tiom da herooj,
Sed lia kor-kolero plu flamegis,
Ĉar dum mort-hor' sin ĉiuj regis.*

*Timu la viron kutimintan
Mortfali sen dolor' grandega.*

*La turk' vidante tian virton,
Eksentis froston ĉe l' korfundo
Kvazaŭ animon lian tuŝus
Glacie frida ponardpinto.*

*Ĉu li malĝojas pro herooj,
Kiujn li vane murdi ordonis?
La turk' ne sentas triston pro la krucoj.
Ĉu li ektimis pri la propra kapo?
Tion povulo al si ne rekonis.
Vidu bravulon, kiel li provas
Kontraŭstari al frid-sento,
Kiu pro la puktado eta
Tra tuta korpo ondas froste obseda.*

*Rigardu kiel kap' kuraĝa
Fiere al ĉiel' leviĝas;
Rigardu la serenon frunton
Kun fulma, sube, okulbrilo;
Vidu staturon, kiu propran
Forton konante rekte staras;
Kaj diru: ĉu videblas tie
Eĉ la plej eta ombro de la timo?*

*Kaj aŭdu, kiel la bravul' parolas,
Kaj la timemajn akre admonas:*

»Ho ve, Durako, maljunulo,
Nun kion fari, kien iri,
Kiam montmusojn mi faligis?
Ĉu monten? Tie la montan' atendas;
Ĉu kampen? Ankaŭ tien li descendos;
Aŭ vi plu vivos por sen kapo resti?
Plej bone estos fuĝi sub nubaron.
Muso mordetas, sed sur ter' vegetas;
Nur aglo al ĉielo sin direktas.
Grimpigu lin al pendigilo svelta,
Instruu l' fino pri valor' de l' timo.
Kaj se ankoraŭ iu turka kapo,
Kiu timas vlahon, vivas ie,
Mi al ĉiel', sub nubon lin grimpigos,
Por predo al korvaro esti tie.

90

100

Tombe silentas la servistoj,
Tombe silentas, predon kaptas.
L' oldulo »Aman!« plore petas,
Kaj lia fil' la vorton saman,
Plorvoĉe »Aman!« nun ripetas.

Staras l' agao montobesto,
Fera kolono, dura ŝtono.
Nur momentet', mansvingo nura,
Kaj ĉesis baldaŭ viv' oldula.
»Medet!« ... »jam la ĝelat' lin prenis
Kaj ŝnure lian gorĝon premis.
Lasta ekspiro, plentrankvilo.

N O K T A V O J A Ĝ A N T O

*La sun' subiris kaj la lun' ekbrilis.
Kiu ŝtelgrimpas laŭ montkol' jen supren,
Jen suben, Montenegron alirante?
Li nokte iras, tage ripozhaltas,
Heroo foje, sed nun ne plu tio,
Sed kan' al kiu nocas briz' kaj ĉio.
Se eksusuras viperet' ĉe l' vojo, 120
Aŭ nur leporo sub arbust' malalta,
Li, foje pli danĝera ol vipero,
Nun tremas kiel kamlepor' timsalta.
Li kredas jen, montlupo venas vera,
Aŭ montara hajduko pli danĝera.
Li timas morte fali dum vojiro
Sen cel-plenum', ĉi arda korsopiro.
Li alte taksas sian junan kapon;
Nek ora kap' ĝi estas nek orita:
Videble, li la kapon savi celas, 130
Kaj io grava lin pluiri pelas.*

*Ĉu estas li hajduk', spiono turka,
Kiu spionas silkolanajn ŝafojn,
Aŭ gregon de la bovoj volvokornaj?
Li nek hajduko estas, nek spiono,
Sed Novica, kavazo de l' agao;*

*La morta malamik' de Montenegro,
Kiun la junaj kaj la oldaj konas,
Kaj montfeinoj vivan lin ne elportus
Tra Montenegro dum plenhela tago,
Des malpli liaj propraj bravaj piedoj.* 140

*De l' ŝultro pendas longa pafiltubo,
Ĉe l' zono akra jatagan' minacas
Kaj tuj apude du pistoloj prete.
La viperneston per mantel' li kovris,
La rimenŝuojn al piedoj fiksas,
Ruĝan rakĉinon al junkap' bravula,
Kaj de saruk' nenia spuro estas.
La turko sen saruko vojon iras;
Videble, li la kapon savi celas,
Kaj io grava lin pluiri pelas.* 150

*Bravul' atente preter Cuce pasis,
Preter Bjelice, gento batalema,
Kaj al Ĉekliĉi fortaj li jam venas.
Li tien venas, kaj al Dio preĝas
Pri helpo, ke li ilin preterpasu
Kaŝita por okul' kaj por orelo.
Videble, li la kapon savi celas,
Kaj io grava lin pluiri pelas.*

*Je l' duaj kokoj en Cetinje-kampo, 160
Novica estis en Cetinje-kampo,
Je l' triaj kokoj en Cetinje-loko
Novica, fine, estis en Cetinje.*

*Li dian helpon al gardist' alvokas:
»Gardisto de Cetinje, dian helpon!«
Pli bele la gardist' al li respondis:
»Bonŝancon, ho delio nekonata!
El kiu vi landpart', de kie venas?*

*Kaj kia sorto igis, ke vi tiel
Frue leviĝu, kia urĝo arda?»* 170

*La saĝa turko embarason sentas,
La saĝa turk' respondon saĝan trovas:
»Ĉar vi demandas, diros mi la veron:
Bravul' mi estas de Moraĉa frida,
El lok' Tusina, el sub Durmitoro,
El vilaĝet' sub monto de la gloro.
Min kore premas tri ĉagrenoj gravaj:
Unua mia korĉagreno estas,
Ke Ĉengiĉ pereigis Moraĉanojn;
Kaj dua mia korĉagreno estas
Ke Ĉengiĉ ekzekutis mian babon; 180
Kaj tria mia korĉagreno estas
Plej prema: ke plu vivas best' venena.
Sed en la nom' de granda Dio ebligu,
Ke mi sinjoron vian nun aliru,
Sinjoron mian kaj samtempe vian,
Li eble de l' ĉagrenoj min sanigos.»*

*Pli saĝe la gardist' al li rediras:
»Armilon for, delio nekonata,
Kaj portu l' kapon, kien vi deziras.» 190
Turko alvenis al kastelpordego
Kaj lasta stelo ĵus malaperinta:
Estis la stelo de agao Ĉengiĉ.*

ROTO

*Leviĝis roto en Cetinje
De Montenegro, la malgranda.
Jes, ĝi malgrandas, sed kuraĝas,
En ĝi nur cent bravuloj estas,
Se ne bravuloj elektitaj
Laŭ bel' kaj laŭ la form' ekstera,
Sed laŭ la korkuraĝo vera, 200
Ili alsturmus ne dek virojn
Por tiel ilin fortimigi,
Sed du por ilin bat-mortigi;
Kiuj la vivon foroferos
Por digna kruc' per kiu hom' krucsignas,
Por digna kruco kaj por or-libero.*

*Mirinda roto! ne dungita
Laŭ la ekzemplo de aliaj.
Ĉi tie ne aŭdeblis vortoj:
»Ek! la kuraĝaj, al montkolo!« 210
»Al montokol', ek! la kuraĝaj!«
Ĉi tie eĥ' de rok' ne resonigis.*

*Sed al mistera voĉ' simile,
Al voĉo de ĉielspiritaj,
Mistera vort' tra Montenegro
De rok' al rok' ekflugis birde,*

*Kaj jen! En nokto al vi ŝajnas:
En frida ŝton' la viv' vekiĝas,
Sopiras, tremas, kapon levas,
El ŝton' malmola jen la pugnon,
Jen kruron fortajn el - elmontras,
Kaj ŝajne tra la frostaj vejnoj
La varma sangriver' ekbolas.*

220

*Kaj poste, jen, pafilo longa
Streĉiĝas al ĉiela alto,
Sed kion la mantel' fidele
Kaŝas ĉe l' zon', la homrigardo
Ne vidas tion... nu, mallumo
Al vi la noktohomon kaŝis;
Armit', sin turne, al voĉ-eĥ' ekmarŝis.*

230

*La surdaj horoj de la nokt' malluma,
Nubo la brilajn stelojn kaŝas,
Mantel' kaj nokto la armilon.
Malhela nokta roto paŝas
Kun la junul' bravega fronte.
Se vir' al viro pri li flustras,
Lin ĉiuj sole Mirko nomas.*

*La roto paŝas, sed nur kien?
Vane demandas vi la roton.
Vane la rapidegajn fulmojn
Kaj laŭtajn tondrojn, kien ili
Sonegas supre de montaro?
Se ĉiam samas la deklaro:
Ne ni, sed la tondrul', al kiu
De ĉiuj pretu servo-faro.»*

240

*La roto paŝas. Kial? Kien?
Nur li en altoj scii povas.
Tiu treege kulpas, certe,*

*Al kies kap' faligi volas
Fortegon tian deĉiele
Verdikt' de lia just' eterna.* 250

*Senbrue l' rot', sen vorto marŝas
Tra surda nokto kaj silent' senfina.
Neniu flustras, aŭ parolas,
Nek ridas, aŭ per kant' gajigās:
El cent virvoĉoj unu ne aŭdiĝas.*

*Sed same kiel hajlonubo
Hajlvipojn pezajn sine gardas,
Kaj flugas kun minac' obtuza
Al lando super kiu haltas:* 260

*Tiel ankaŭ l' roto noktvolvita,
Konforme al la justa mano dia,
Paŝas sen vort' kaj al kulpul' malkaŝas,
Ke eĉ se fulm' pro kulp' ne tuj reagas,
Sekuro mankas, ĉar ju pli la fulmo
Per pun' malfruas, des pli ĝi bat-skuas.*

*Ne tintas la armiloj brilaj.
Nek tondras murdaj pafiltuboj,
Nek al leĝera paŝ' ektintas
La vestaj tokoj, sed kontraŭe,* 270
*Kvazaŭ konante sian ŝarĝon,
Al rimenŝuoj de l' bravuloj
Krutaj' fordonas sin spontane
Kun alta mont' cedema same.*

*Kunulo kun fidelkunulo paŝas
Nedisigeble, firme kaj sindone,
Kiel Ĝemeloj, brilaj steloj
Post malaper' de l' suna helo.*

Komljani jam, Zagaraĉ same
Kun Bjelopavliĉ batalema 280
Delonge jen, post ili restis,
Kaj feblaj Rovci jam aperas.
Post tiu lok' la nokt-kunuloj,
Je l' frua horo de l' aŭroro,
Jen, al Moraĉa glora fluo,
Jen, al Moraĉa frida venas,
De kiu nom' de l' land' devenas.

Dume la rot' pasigis tagon
Haltinte ĉe l' river' malvarma.
Iu ekkuŝis sur rosherbon 290
Pro refreŝiĝ' per dormo milda;
Iu pri l' pafiflamo zorgas
Kaj nombras la fiŝekojn murdajn,
Aŭ de l' tranĉil' fidela klingon
Fidindan nun per akriĝil' akriĝas;
Per ŝtal' , jen, iu el silik' fajron
Eligis kaj ĝin ŝovas en foliojn
Kaj la branĉfaskon sekan surmetinte,
Post momentet' jam per buŝblo' fortega
Ekscitas fajron; la alia 300

Junŝafon, kiun donis mildaj ŝafoj
Sur avelarba rostpikilo turnas,
Aŭ blankan pecon da fromaĝo
El sia sak' fidela haste prenas.
Soif se premas, la river' konvenas;
Se glas' bezona, man', jen, serv-propona.

Kaj dume jam aŭror' ekrugiĝis,
Kaj tie, en najbara monto
Paŝtist' aŭdiĝas, kiu gregon vokas,
Al kiu sonoril' belsona 310
Respondas de l' virŝaf' greg-fronte.

*Sed, jen, aperis nova jam paŝtisto
Modesta, li al sia grego iras.
Lin nek arĝent', nek orornam' distingas,
Sed sole virt' kaj nigra pastra robo.
Eskorto pompa lin ne akompanas
Kun luksaj lumigiloj kaj kandeloj,
Nek sonoriloj de la preĝejturo:
Lin akompanas sun' de l' okcidento
Kaj sonoril' virŝafa el montgrego.* 320

*Preĝejo lia: firmament' mirinda,
Altaro digna: valo kaj montaro,
Incens': parfum' ĉielen leviĝanta
El flor' miela kaj el mondo hela,
El varma sang' por kruco elverŝita.*

*Kaj kiam al la roto proksimiĝis
Servanto digna de l' pli digna estro,
Li dian helpon al la viroj vokis.
Kaj kuniginte bravajn kuraĝulojn,
Li paŝojn al malvarma ŝton' irigis, 330
La ŝton' malvarmas, sed la koro varmas,
Kaj la bonul' al roto jenon diris:*

*»Infanoj miaj, bravaj batalantoj,
Ĉi tiu ter' al vi la vivon donis,
Ŝtonoza tero, sed por vi orbrila.
Ĉar avoj viaj sur ĉi ter' naskiĝis,
Kaj patroj viaj sur ĉi ter' naskiĝis,
Kaj vi mem ankaŭ sur ĉi ter' naskiĝis:
La mond' por vi pli belan ne posedas.*

*»Por ĝi la sangon avoj viaj verŝis, 340
Por ĝi la sangon patroj viaj verŝis,
Kaj ankaŭ vi por ĝi la sangon verŝas:
La mond' por vi pli karan ne posedas.*

*Supre de alta rok' la aglo nestas,
Ĉar la libero en eben' ne estas.*

*»El vi, do, kiuj kutimiĝis
Sobre pasigi viajn tagojn,
Kiu atentas, ĉu rok' donas vinon?
Kiu atentas, ĉu rok' donas grenon?
Kiu atentas, ĉu rok' donas silkon? 350
Dum fontoj je la freŝa akvo abundas,
Kaj dum multnombraj brutoj vale blekas;
Dum malgrandkreskaj ŝafoj monte heas?*

*»Pulvo ne mankas, ankaŭ plumb' sufiĉas;
La dekstra mano fortas de bravulo;
Sub la palpebroj la okul' de falko;
Kaj bruste la varmega koro batas;
La kredo firmas, perfidaj' ne eblas;
Kunfrat' kunfraton ŝatas, kaj fidela
Edzino la fidelan edzon amas; 360
La nobla kant' laboron akompanas;
Armil' se mankas, turko ĝin posedas:
Jen ĉio, kion kor' dezire petas!*

*»Sed kio plej distingas ĉi ŝtonmonton,
Jen kruco digna super ĝi pompanta.
Ĝi, vin en malfeliĉo fortiganta;
Ĝi, per ĉiel' ŝirmanta vin patrono.*

*»Ho, se l' popoloj de ĉi mondo vidus
El ebenaĵoj, kie vid' perfidas,
Ĉi krucon, kiu, sen malvenk', sur Lovĉen 370
En alton sin etendas, kaj se ili
Imagi povus, kiel turka monstro,
Penante ĝin per granda faŭk' engluti,
La dentojn vane rompas sur ĉi rokoj;
Ili ne starus manojn kruciginte,*

*Dum vi pro kruc' suferas, nek malinde
Barbar' vin nomus tiuj, kiuj dormis,
Dum vi por kruc' la vivon oferdonis!*

*»Por kruco digna vi mortfali pretas.
Por sinofer' vi ankaŭ nun leviĝis, 380
De l' Di-kolero vi venĝantoj bravaj;
Sed kiu volas Dion prete servi,
Per pura kor' li devas tion fari,
Kaj puranime faru devon sian,
Kiu plenumi volas volon dian.*

*Se iu inter vi ofendis fraton;
Se iu al rivalo febla vivon
Forprenis, animpekon fare;
Se iu pardon fermis al vojanto;
Eĉ se ĵurinte, iu rompis ĵuron, 390
Kaj al malsata ne havigis nutron;
Se iu al vundit' ne vindis vundon;
Ĉio ĉi estas peka far', malbono:
Sen pent' sincera ne eblas la pardono.*

*»Dum estas tagoj, ek! al pento pia,
Dum estas temp', infanoj, ek! al pento;
Ĉar baldaŭ, je alvok', animo via
Foriros, fine, al ĉiela estro;
Nur ek! al pent'; fluante vivo nia
Rapide glitas for, do, ek! al pento: 400
Jam dum tagiĝo frua, lumradia,
Sin trovos multaj sur voj' sen reven, — do,
Ek! ek! al pento...«*

*Sed en gorgo
De l' bonoldul' la vorto haltis,
Kaj sur la griza barbo klara*

*Larmguto en la sunradioj
Kiel tre eta perl' aperis.
Junaĝo ankaŭ lin, verŝajne,
Ripročas per memor' amara,
Kaj sanigante fremdan vundon, 410
Li sian propran rememoris:
Ĉar bonpaŝtist' ne scias nur proponi,
Sed eĉ per propra far' ekzemplon doni.*

*L' amaso staras kortuŝita
Per milda vorto de l' oldulo;
Ŝafidoj iĝis, ŝajne, kiuj
Leonoj estis de l' ŝtonmonto;
Tian miraklon faras dia vorto.*

*Sed kiu dume ekaperis 420
Antaŭ l' okul' de l' rot' modesta,
Ke tuj cent manoj cent tranĉilojn
Per unu fojo haste kaptis?
Miriga homo! kiu povas
Cent korojn turni for de l' ĉielo,
Cent volojn, kiuj nun decidis
Detrui tiun solan koron!
Novica estas, damnito sanga.
Novica, kiu libervola,
Al piasenta rondo iras,
Kaj al oldul' proksime stare 430
Parolas laŭte, vort-malŝpare:*

*»Per Dio, bravaj fratoj montenegraj,
Ne tuŝu mane la armilon brilan.
Novica estas mi, sed ne la iama,
Ne kontraŭ vin, mi kun vi iri volas
En turkan sangon trempi miajn manojn.
Ĝisnunan tutan havon ĉe la turkoj*

*Al mi l' agao rabis for malinda.
Nenio krom la dekstra mano restis,
Kaj ĝi de nun la montenegra estu. 440
Sed ĉar al kruc' bravul' baptita decas,
Mi tre deziras, baptu min, sed haste,
Ĉar temp' devigas agi senprokraste.»*

*Post tiuj vortoj la cent manoj
Pri akra armilo tuj rezignis,
Kaj cent okuloj tra larm-gutoj
Anstataŭ sun' pluvarkon vidis.*

*Al okulsigno de l' oldulo
Bravuloj ĉapon al li donis:
»Ho kedu, filo, la ĉielan patron, 450
Kaj same lian porĉiaman filon,
Kaj trie: la spiriton gracoplenan:
»Al kredo fidu, kiu nepre savos!«
Li diris kaj surverŝis herezulon,
Kion atestis la montaro alta
Kaj ĝiaj filoj roto en montaro.*

*Tiam l' oldulo levis la okulojn,
Mildajn okulojn kaj la blankajn manojn,
Kaj tiel roton de l' pek' liberigis.
Post tio Dion li al ĝi donacis: 460
Al ĉiu viro li ereton donas
De la mistera nutro, pan' ĉiela;
Al ĉiu viro li guteton donas
De la mistera trinko, vin' ĉiela.
La arda suno miras: jen la feblajn
Febla oldul' fortigas, por ke ili
Laŭ forto povu Dion pli simili.*

*Kaj kiam la oldul' finfaris tion,
Ĉiuj kunuloj nun interkisiĝis.*

*Plenas la rot' de Dio, kaj ne estas
Kiel tranĉil' en sang' trempita,
Kiu mortige korpon pikas:
Sed kiel sankta, ora plumo
Per kiu la ĉiel' la posteularon
Pri patraj heroaĵoj atentigas.*

470

*La arda sun' postmonten jam eksidis;
L' oldul' foriris, roto voj-daŭrigis.*

HARAĈO

*Ho, kamp' de Gacko, vi tre belas,
Kiam malsat' en vi ne estas,
Malsato prema kaj mizer' terura!* 480
*Sed vin hodiaŭ, povran, forte ekpemis
Kruelaj viroj, brilaj bataliloj,
Batal-ĉevaloj kun la blankaj tendoj,
Katenoj pezaj kaj horor-falakoj.*

*Pro kio viroj, brilaj bataliloj?
Pro kio blankaj tendoj kaj ĉevaloj,
Katenoj pezaj kaj horor-falakoj?
L' agao sang-haraĉon nun kolektas
En kamp' de Gacko kaj en la proksimo.* 490
*Li kampomeze lokis la tendaron,
Kaj dise sendis haraĉ-kolektantojn,
La kolektantojn, lup' disŝiru ilin,
De l' homa kap' dukaton li postulas,
De la fajrujo dikan ŝafoviron
Kaj por la nokt' knabinon laŭ la vico.*

*De l' orient' la kolektantoj rajdas,
Rajahon vost-ligitan alkondukas;
De l' okcident' la kolektantoj rajdas,
Rajahon vost-ligitan alkondukas;
La drakoj rajdas el nord' kaj el sudo,* 500

Rajahon vost-ligitan alkondukas.
Rajaho malfeliĉa, braktordite,
La ĉevalspurojn sekvas ŝnurligita.
Ho Dio, kion la rajaho kulpas?
Ĉu tion, ke malpuro turkojn premas?
Aŭ tion, ke aĉulo ilin vipas?
Kion ĝi kulpas? — *Spacon* ĝi okupas,
Sen eblo kontentigi turkan volon:
La blankan panon kaj la flavan oron.

Bonan ĉevalon la agao 510
Vigle ĉe l' tend' saltigas tien-reen,
Kaj per ĝilit' la klar-okulon
Kaj dekstran manon rajde ekzercas.
Jen, li la turkojn venkas ĉevalsalte,
Jen, harbo-ĵete en konkur' plej foren,
Bona hero', se tia hom' li estus!

Kaj rimarkinte kian predon
Koleraj kolektantoj trenas,
Li kiel sag' alsturmis haste 520
Sur bonĉeval' kulaŝ' rajdante,
Kaj dum flugrajdo, pro ekprovo,
Ĝilton kaptis mortpreparan
Kaj ĵetis ĝin al vlaha kap' najbara.

Ankaŭ al kuraĝulo foje
La man' aŭdaca ekdormetas.
Kaj nun la samon volis misevento.
Ekstumblis la kulaŝo hasta,
Svelta ĝilit' aere eksiblis,
Kaj facilmova, en zigzaga flugo,
Ĝi ne ŝafidon, sed la lupon trafis, 530
Kaj al Safero vlahon kondukanta
Lumeton el la kap' eligis.

*L' okul' ŝprucfluis sur la verdan herbon,
Kaj turkon la malhela sango kovris.
Kiel serpent' vundita turk' eksiblis;
Ekflamis la agao, arda flamo:
Ho estas hont' por tia kuraĝulo
Haraĉ-kolekti kaj ne finkolekti,
Ĝiliton eljetinte, ne rajahon,
Sed propran turkon de vidpov' senigi, 540
Kaj tiel mokon al rajah' ebligi.
Ekflamis la agao, arda flamo,
Kio de nun okazos, ho ve, Dio,
Se vlahoj kulpis jam ĝis nun pri ĉio!
»Ek! Mujo, ek! Hasan', Omer'', Jaŝaro,
Hundbestoj, iru, kursaltigu
La bonĉevalojn ebenkampe,
Por vidi la kurpovon de la krucoj!
L' agao kiel bovo ekhurlis.*

*Hastaj servistoj hastis kiom eblis, 550
Saltigis kampe la ĉevalojn bonajn.
Kri' eĥas de l' servistoj sur ĉevaloj,
Kur' ekas de ĉevaloj sub servistoj,
Ekveas la rajaho post ĉevaloj.
Minut' unua: ŝajnas, ke kurvenkos
Rajah-hirundo feajn flug-ĉevalojn,
Minuto dua: ne eblas jam konstati,
Ĉu la ĉevaloj, ĉu l' rajaho venkas;
Tria minut': ĉevaloj forrapidi,
Rajah' postresti, laca, jam komencas; 560
Kaj dum la kvara eblis vidi povran
Rajahon, kiel ĝi al tero falis,
Dum flugil-kruraj bestoj ĝin laŭ vojo
En kot' kaj polvo tere trenis;
Kiel Hektoron antaŭ Trojo, kiam*

*La dioj, fine, jam forlasis Trojon.
L' agao gapas, liaj turkoj gapas,
Kaj per la trista scen' kolerajn
Siajn okulojn tie paŝtas,
Kaj la teruran sangsoifon* 570
*Per vlaha sang' estingas, per sufero.
Kaj ĉar nun ilin kaptis korgojego,
Ili ridegis, dum rimarkis,
Ke la rajaho, ke la hundoj
Sveninte al la nigra tero falis.
Same rid' eĥas en Hadeso,
Dum pekul-lukto kun sufer' sen ĉeso.*

*Koleraj turkoj ne laciĝas;
Laciĝis nur ĉevaloj bonaj* 580
*Erpante per erpil' terura,
Per viva karno la ebenan kampon,
Laciĝis trene, haltis ripozeme.*

*Tiam l' agao: »Nu, servistoj,
Rajah' mortaĉis kun haraĉ', servistoj;
Sed iru, ek! rajahon revivigu,
Por savi iel al mi la haraĉon.«*

*Servistoj misaj de pli misa estro
Kanĝiojn, tuj, trioblajn enmanigis
Kaj saltis de sur rapidegaj bestoj,
Por sturmi sur rajahon duonmortan,* 590
Por provi iel ĝin rekonsciigi . . .

*Rimen' de l' senidulga vipo,
Kiun direktas lerta mano,
Tra la aer' sensenta siblas,
Kaj per triobla dent' tramordas
Senvivan haŭton de l' martiro,
Farante ruĝajn sangofontojn;
Aŭ se la lerta mano mise frapas,*

*La vip' sur korpo nigre-blujajn
Figurojn de serpent' desegnas, 600
Dume viktim' sub ĝi al morto cedas.*

*»Rajaho, supren, ek! leviĝu,
Leviĝu, krucoj, ek! hundbestoj!«
El turka buŝ' diseĥas vort' tra l' kampo.
Kiu pli fortas, li la svenan
Korpdforton dum vipad' kolektas
Kaj penas iri per pied' falema;
Sed la pli febla, kiel tra sonĝo,
Aŭskultas la malbenajn vortojn
Kaj ĉiam pli sentante l' pelpikilon, 610
L' animon jam duonfuĝintan
Retenas kaj nun kvarpiede
Jen rampas kampe: pruvo trista,
Ke ne nur la lastjuĝa korno
Povas mortintojn al juĝhor' venigi,
Ĉar vip-trioblo povas sam-efiki.*

*Kiam alrampis la tendaron
Rajah' sanganta, tristoplena,
L' agao, monstro abomena,
Ekhurlis: »Ek! rajah', haraĉon! 620
Aŭ pli regalos skurĝoj la malsaĝon!«*

*De Dio al birdoj, jen, ĉiel' donitas,
Trunkkavoj pacaj, nestoj laŭ deziro;
Al fiŝoj akvo kaj la vasta maro,
La vitra domo por vastiĝi dise;
Al sovaĝbestoj je dispono estas
Herbejoj, montoj, grotoj kaj arbaroj;
Kaj al rajaho eĉ pankrust' ne restas
Sekega por moligi ĝin per larmoj.
Sed ĉu mi pravas? La ĉiel' havigis, 630
Nur turko ĉion al si alproprigis.*

»Haraĉon!« Kie trovi ĝin rajaho?
De kie or' al hom' sen domtegmento,
Sen paca dom' por ŝirmi sian kapon?
De kie or' al homo sen plugkampo,
Se li per ŝvit' la turkan kampon akvas?
De kie or', se hom', sen propra bruto,
Trabatiĝante monte l' fremdan paŝtas?
De kie or' al homo vest-malhava?
De kie or' al homo pan-malhava?

640

»Nudec', malsat' nin premas, estro!
Atendu, ho, nur kvin, ses tagojn,
Ĝis ni haraĉon per almoz' havigos!«

»Rajah', mi pri haraĉ' insistas!«

»Ni panon hezonegas, estro!
Delonge panon ni ne vidas!«

»Atendu, kruco, kiam nokto
Silente de l' ĉiel' descendos,
Rostaĵon donos mi, ne panon!
Sed kruc' nudplandas, viroj, do, subforĝu
Ĝin haste, hundo gratu ĝian panjon!«
L' agao diris kaj al tend' ekiris.

650

Servistoj la rajahon kaptas,
Sed pleje, tamen, la unuokula
Safero, kiu super ĉiuj saltas,
Kaj je ilia ĝoj' senbrida,
Li venĝ-soifas pro lumil' perdita.

Aŭdiĝas knaro de falakoj
Kaj kri' sovaĝa de Safero:
»Ni pri haraĉ', rajah', insistas!«
Vekri' respondas de rajaho:

660

»Ni panon bezonegas, estro,
Delonge panon ni ne vidas!«

»Atendu, kruco, kiam nokto
Silenta de l' ĉiel' descendos,
Rostaĵon donos mi, ne panon!«
Damnit' per damna vort' respondas.

Sed, kiu pentros nun fidele
Suferojn, kiujn kruc' eltenis?
Kiu mezuros korkviete,
Kiom amara tristo premis? . . .

670

Post tagopaso kaj post sunsubiro
Ekregis nokt' sensona kaj trankvilo.
Steloj surŝutis la ĉielon,
Ueston jam la nokt'vual' envolvis;
Kaj ĉielmeze brilas duonluno,
Trista kandelo de l' scenejo trista.

Meze de l' paca, vasta kampo
Tilio maljunega kreskas.
Apud tilio tendoj staras,
Kaj inter ili la plej bela,
Plej bela, vere, kaj plej granda
Leviĝas tie l' tendo de l' agao,
Samkiel cigno, blanka birdo
Inter la birdoj, blank-kolomboj.

680

Blankas la tendoj blankaj, brilaj
En la lunbrilo songtrankvila,
Kiel grandegaj tomboj sub la neĝo,
Ronde de kiuj tardahore svarmas
Spiritoj malboncelaj kaj timigas
Per terurbildoj noktan vojiranton,
Aŭ per ŝajniga leonbleko

690

*Kaj hundbojad' kaj kri' de l' suferantoj
Streĉan orelon lian surda faras.*

*Vi kredas; tomboj de la slavaj
Prapatroj, kies glora nomo
Tre malproksime disvastiĝis,
Ĉe kiuj la sovaĝaj turkoj
Tagmeze kaj nokthore, abomenaj,
Svarmegas kaj medite streĉas 700
La cerbon, kiel kaj per kio
Timigi la posteularon
Plorantan pri l' pasint' feliĉa,
Por ke jam ĉesu plend' pro aĉa sorto.
Al vi, jen, ŝajnas, nun leono blekas,
Al vi, jen ŝajnas, ie hundo bojas;
Aŭ jam veado de martiroj eĥas,
Vekrioj, sibloj, sopirĝem' dolora;
Vi aŭdas de l' katena fer' tintadon
Kaj la helpkrion tranĉan; ho, kunfrato, 710
Ĉu ankaŭ krio estas senteraro?
Ĉu eĉ fer-tinto estas senteraro?
Aŭskultu ... ĝi ne estas senteraro,
Mi vidas, ke korvundo via ŝvelas . . .
Vi ploras? ... plor' ne estas senteraro,
Pro senteraroj larmoj ne aperas!*

*Antaŭ la tendoj fajro brulas
Kaj ĉe la fajroflam' moviĝas turkoj.
Iu surmetas novan lignopecon,
Alia buŝokavon blov-pufigas, 720
Per blov' provante fajron ekflamigi;
Jen, iu kruroflekse kaŭras
Ĉe l' fajro kaj sur forkoforma
Tenil' virŝafon grasigitan turnas.
Virŝafo ĉirpas super la ardajo,*

*Kaj ĝin deflanke lekas la flamlangoj
ŝvitrosan tiel lumigante,
Kiu aperas sub la turka ĉalmo.*

*Kiam la turk' satturnis la virŝafon,
Li ĝin deprenis de la peza akso, 730
Ŝovinte l' grandan sur sinion basan,
Por ĝin per granda tranĉileg' distranĉi.
Al preparita sofro tuj eksidis
Malsataj turkoj kiel veraj lupoj
Kaj sian predon unge dispecigis.
L' agao prete ekmanĝis la unua
Kaj poste Baŭko kun aliaj turkoj
Laŭ bela ordo de la montaj lupoj.
Ili simiton blankan surtabligis
Kun botolet' da brando al ĉiu kapo, 740
Ĝuante de l' viand' kaj pan' fortiga
Kun fajra diablaj' soif-estinga.*

*Kiam l' agao venkis la malsaton,
Kaj koleregon per brand' duobligis,
Li reekflamis kiel flamo arda:
Ho estas hont' por tia kuraĝulo
Haraĉ-kolekti kaj ne finkolekti,
Ĝiliton elĵetinte, ne rajahon,
Sed propran turkon de vidpov' senigi, 750
Kaj tiel mokon al rajah' ebligis.
Ekflamis la agao, flamo arda,
Kaj diris: »Viroj, da viand' sufiĉe;
Ek! ĵetu al rajaho ostojn riĉe.
Nu, ĵetu, ek! preparu la rostafon,
Kiam mi vokos, ĉio devas preti.«
Li beste kriis kaj al tend' ekiris.*

*Foriris la servistoj vespermanĝi
Kaj post la manĝo ĝojon okazigi,*

*Per seka pajlo kaj malmola ŝnuro,
Por prifumaji la rajahon spitan, 760
Al branĉ' de tiliarbo pendigitan
Kun kruroj supre kaj kun kap' altere;
Por prifumaji, por eltiri oron
El la rajaho nuda, pan-sopira.
Kaj kion faru la rajaho trista?
Ĉielo altas kaj la ter' malmolas;
Kun trista kor' ĝi gapas turmentilojn,
Kun trista koro, sed okul' ne ploras.*

*Kaj kiam sin preparis la servistoj,
Ilia kor' ne povis ĝisatendi, 770
Malpleje la unuokul' Safero,
Ke, fine, kriordonu la agao:
»Nu, hazur, viroj, kun tilia kruco,
Grimpigu ĝin al branĉo tiliarba!«*

*L' agao dume sub la tendo sidas,
Kun li la ruza vojevodo Baŭko,
Kaj lia ĉat' Mustafafo tre fidinda,
Apud aliaj plej elstaraj turkoj.*

*Kaj en la tendospaco rondlinie 780
Tapiŝoj belaj kuŝas dise;
De supre, jen, duŝekoj molaj
Pompas en brila luks' kaj vikle
La homan korpon al volupt' invitas,
Al dolĉ' volupta kaj al song' trankvila.
En flanka loko sur etflama fajro
La ĵus hakitaj frondoj brue krakas,
Aŭ brule pepas kaj kanteton karan
Plorvoĉe kantas kaj kantvoĉe ploras.
Sed meze sur dikega arbotrunko,
Ronde de kiu en linio vasta 790*

*Fiera blanka tend' sterniĝas,
Armiloj akraj pendas en plenbrilo:
Mortsemaj tuboj, feraj bataliloj.
Ĉi tie la damaskaj sabroj kurbas,
En vlaha sang' centfoje jam trempitaj;
Jen, jatagan' okoble pendigita;
Kaj tranĉiletoj preskaŭ nenombreblaj;
Longan pafilon bele origitan
Plurloke povas tie vi rimarki,
Kaj de pistoloj kvanto nedireblas.* 800

*Sed kio, tie, kun topuz' kunestas,
Belaj' mirinda ĝis nun nevidita,
Ŝafido milda apud' lup' malhela,
Feino svelta kaj drak' furioza?
Vi guzlon vidas, sed ne timu, frato,
Ke ĝin disrompos la topuz' batala,
La kordojn transformante je katenoj,
La arĉon je pafark' kaj kordseleton
Je batalĉeval'. La slav-feinojn
Ne kaptas tim', ke ili vivon perdos 810
Restinte apud batalil' sespinta;
Eĉ sciu: kie oni ĝin ne trovas,
Maturi tie slava kant' ne povas.*

*Kaj korte la ĉiel' per nigraj
Tenebroj belvizaĝon kovris
Kaj se tra nuboj eblus vidi,
Super la blanka tend' trembrilus
Plejadoj, la malgrandaj steloj;
Kaj vin la volvokorna luno gapus
De l' uesto, fronte al brilpuraj steloj, 820
Kiel virŝaf gvidanta la ŝafaron.
Ekstere blinda nokto surda.
Nenie voĉ', nur ros' faletas,*

Rosgutoj etaj, kiel larm' ĉiela.
Mallum' densiĝas, noktobskuro densa
Ekregis super ebenaj' kaj monto,
Ke vi la fingron ĉe l' okul' ne vidas,
Kaj kiel vidi antaŭ si la vojon?
Ho ve, al homo, kiun trovas
La nokto voje, kaj la povra
Dormejon nur sopiri povas!

830

Ventegoj pelas sin ĉiele,
Kaj rapidfulmoj aliflanke,
Per fajr' ĉielon enfendante;
Jen, ili vin nun blinda faras,
Jen, per pli densa nigro vian
Okulon ili tutvualas.
Post tio orelkaptu tondrobruon;
Unue ĝi el foro sin anoncas,
Kaj poste pli proksime, pli terure
Brueg' fortega en montar' reeĥas.
Eben' sonegas kaj ĉiel' lumdona,
Kun valo kaj kun la montar' resona:
Laiŭ ĉio ŝajnas, peza hajlo falos.
Ho, ve al homo, kiun trovas
La nokto voje, kaj la povra
Dormejon nur sopiri povas!

840

Sed se al vent' vi dorson turnus,
Kiam la fajro el nubar' ekfulmas,
Kaj se vi per okul' klarvida
Rigardus al ebena ventdirekte,
Vi vidus la homgrupon, kiu iras
Kaj ĉiuj kunas, eĉ se nokt' disigas.

850

Jen, fulmobril' al ili montras vojon,
Jen, nokt' al ili vojon rabas.
Sed ili per facilaj paŝoj

Laŭ kampobskur' antaŭen iras,
Kaj spacon inter si kaj tendoj
Per marŝ' rapida malgrandigas:
Ili en nokto al dormej' sopire, 860
Obskuron provas trapanetri ire.

Kaj reekfulmas flam' ĉiela.
La noktkunuloj pli kaj pli proksimas,
Kaj vi kapablas jam distingi,
Kiu, do, gvidas, kiu kune iras.
Ŝajnas, ke unu estas la grupestro,
L' alia vojgvidant' sindona,
Kiu konante ĉi landparton
Tra nokt' eskortas la irantojn.
Ho, frato, kia paŝ' facila, ŝajne 870
Li naĝas tra l' aer' malhela.
Vi dirus, io lin antaŭen tiras.
Kaj dume lia kunularo
Ducentpiede lian spuron iras.
Eble en nokto ili timas iri
Kaj jam komencis je dormej' sopiri.

Sed la fulmbrilo, kiu nun ekfulmis,
Sekretan aron vidis post tendaro,
Kie viciĝis, lerta, de l' tri flankoj,
Por tiel al okul' multnombra ŝajni, 880
Kaj tie l' nokto-roto staras
Kiel subita tondrofrapo,
Aŭ bruleganta varma lafo,
Kiu de l' montoj fajrojetaj
La valon broge superfluas,
Dum homoj jam senzorge dormon ĝuas.

La roto staras, kaŝaŭskultas sonojn,
Scivola pri l' dormejo de la estro;

Sed voĉ' nenie, sole kiu spitas
Estas Safero, kiu kun kunuloj 890
Jam nun suferojn de l' rajah' priridas.

L' agao sub la tendo sidas
Alternigante kafon kun tutuno,
La nigran kafon kun fumnub' infera.
Kaj lia frunto sub la ĉalmo
Pleniĝis de malhelaj sulkoj,
Kaj pri l' okul' sub frunto ŝajnis,
Ke ĝi de nubotuf' ombriĝis,
Kaj li medite dronas en silenton.
L' agaon tre diversaj pensoj kaptas: 900

Pri glav-balĉakoj kaj knabinaj brakoj,
Pri ĉaso-predo kaj pri falk-posedo,
Pri or-valoro kaj pri militgloro,
Pri palis-duro kaj pri montbravuloj,
Eĉ pri ĝilito kaj pri lanco-spito,
Kaj li ekflamis kiel arda flamo:
Ho estas hont' por tia kuraĝulo
Haraĉ-kolekti kaj ne finkolekti,
Ĝiliton eljetinte, ne rajahon,
Sed propran turkon de l' vidpov' senigi, 910
Kaj tiel mokon al rajah' ebligi.
Ekflamis la agao, arda fajro,
Kaj kiam li sonorane guzlon vidis
Inter armiloj pendi tie,
La furioz' de l' sango cedis,
Ĝia amar' je dolĉ' ŝanĝiĝis,
Kvazaŭ ĉiel' agordus kordojn.
Kaj granda sangsoiĝo, la pli frua,
Soiĝo iĝis je la kanto:
Jen, tiel dolĉas la kantsono flua! 920

*Kaj la agao nun al Baŭk' parolis:
»Ho, Baŭko, mia brava vojevodo,
Pri viaj heroaĵoj iras famo;
Sed se la montaj musoj kur-atakus,
Kiom da musoj, diru, vojevodo,
Vi povus tute sola batfalogi?«*

»Nu, ses el ili, mia bona estro.«

*»Aĉul', hundaĉ' vi estas, vojevodo,
Mi kredis vin pli granda kuraĝulo;
Se dudek montaranoj kuratakus, 930
Ne helpu min la turka kred', se sola
Mi ĉiujn dudek kapojn ne detranĉus.
Sed tio al mi preskaŭ zorgojn faras,
Dum mi pipfumas kaj la pensojn turnas,
Ke nokt' obskura al mi ne permesas
Per fumaĵad' de krucoj amuziĝi.
Sed vi, per mia kred', bonege kantas,
Kaj mi al guzlo kaj al kant' sopiras:
Nu, kantu kaj estingu l' kantoifon.«*

*Leviĝis Baŭk', deprenis guzlon, 940
Kaj la piedojn kun modest' fleksinte,
Sur sia loko residiĝis;
Ĉi tie guzlon li al mola
Duŝek' apogis kaj per arĉo
Sonora laŭ la ĉevalvosto
Per mano tien-reen forte ektiris;
La agordil' eknaris du tri foje
Turnata, kaj per voĉ' fortega,
Ĉe l' son' de l' agorditaj kordoj,
Ruza kantist' komencis jene kanti: 950*

*»Ho Dio kara, vera mirindaĵo,
Kia sin montris potencul' Rizvano*

*Kaj per la sabro kaj per lanc' fleksebla,
Kaj per pafilo kaj tranĉil' danĝera,
Per forta pugno kaj ĉeval' bonega!
L' agao al Kosovo-kamp' descendis
Kaj car-haraĉon tie lu-kontraktis,
De l' homa kap' dukaton li postulas,
De la fajrujo dikan ŝafoviron
Kaj por la nokt' knabinon laŭ la vico.* 960

*Kolektas la agao car-haraĉon,
Rajah' rezista donas kaj ne donas.
Kie laŭ kap' li flavan oron volas,
Li ofte eĉ sen kupra mono restas;
Kie virŝafon dikan de l' fajrujo,
Tie la ripoj de l' donac' videblas;
Kie por nokt' li junknabinon volas,
Tie mizera oldulin' ne venas.*

*Spitan rajahon kaptas la agao,
Vicigas ĝin en kampo je distanco,* 970
*Kaj ĝin transsalti sur ĉeval' komencas.
L' unuajn dek transsaltis la agao;
La sekvajn dek transsaltis la agao;
Kaj ĉe la tria deko, kiu sekvis,
Fajra ĝogato fajre kapriolis,
Ĉe l' vigla salt' la damna brid' ŝiriĝis,
Kaj la povulo sur herbej' sin trovis.*

*Post tio nur mallonga tempo pasis,
Ekiris flustra vorto buŝ-al-buŝe
Tra bela kamp' Kosovo tre rapide.* 980
*Kaj ju pli poste, des pli forte kreskas
La rido kaj mokŝercoj de rajaho,
Ĝis nova kant' el guzlo fine ekĝermis,
Kaj nun blindulo en Kosovo kantas:
— Estis fiul' Rizvano potenculo.»*

*Se iu, dum fatala kanto
El bus' de Baŭko tondre diseĥiĝis,
Ne la kantiston, sed l' agaon
Okule fiksas, li tuj povis
Ĉagrenon vidi sur vizaĝo, 990
Doloron kun koler' kaj furiozon
Kaj cent aliajn eriniojn,
Kiu nun en fiera koro,
Ĉe ĉiu mokalud' hontiga,
Per sangaj ungoj dolorneston boras.*

*Unue sanga flam' en lia koro
Ekboldis kontraŭ damna hord' rajaha,
Kontraŭ la hunda gento vlaha,
Fia, tilia kruc' neniel inda
Pri l' varmoĝu' sub suno lumradia. 1000*

*Pri ŝnur', katen', venen', tranĉilo,
Pri sabro, fajr', palis' terura,
Ole' bolvarma kaj pri cent turmentoj
Heroo ĉimomente pensas,
Por spurojn igi for de l' hont' amara
Kaj la memoron puran kun la nomo
Konservi per mildsona kordo klara.*

*Sur liajn brovojn nigra nub' eksidas;
L' okuloj flamas kiel arda flamo;
La ruĝa flam' la vangojn salte lekas; 1010
Pro furioz' naztruoj, jen, vastiĝas;
Kaj lia bus' el sub la ŝaŭmo blanka
Mienon elinferan faras,
Kvazaŭ ĝi dirus: mortu rajah-bando,
Oni sin gardu kontraŭ pov' de l' kanto!*

*Ĉe lasta vorto, kiun Baŭko diris,
Neatendite, kvazaŭ hasta*

*Fulmo penetrus lian cerbon:
Rajah' ne povas honton sola atesti,
Ĝi sola sen okul' , sen buŝo estas; 1020
Ek! vipu turkojn kun rajah' perfida,
Nur la memoro estu konservita.*

*Sed dume li teruran penson
Sur fundo de la koro kaŝe trempas;
Li vizaĝtraĵojn bridas kaj mildigas,
Sed la vizaĝon ĉiam pli videble
Jam venkas kolerflam'; al mond' li volas
Trankvila ŝajni, sed li tuta tremas.
Kaj fine, kiam buŝ' la koleregon
Al atestantoj ne plu povis kaŝi, 1030
Li kriis flamiĝante: »Hazar, viroj,
Ek! kontraŭ krucoj per tranĉiloj akraj,
Per fajro, bol-oleo kaj per sabro;
Disforĝu ĉiun povon de l' infero!
Hero' mi estas, kant' pri mi fieros;
Por tiu cel' mi ĉiujn foroferos! . . .«*

*L' agao ĉion ne eldiris,
Kaj korte la pafil' ektondris
Kaj al Safero, kiu l' unua,
Aŭdante l' estron, prete saltis, 1040
Duan okulon ŝpruc-elverŝis;
Kion ĝilito por komenco
Nur akaparis, ĝin pafil' finfaris.*

Eksonis ĉie krioj: »Vlahoj, vlahoj!«

*Tiam l' unuaj el la roto
Ŝargaĵon al tendar' paŝutis.
La turkoj krias: »Vlahoj, vlahoj!«
»Ĉevalon!« — hurlas la agao.*

Tiam la duaj paf-ektondris.
»Vlahoj de ĉie! Pafu! Tranĉu!« 1050
»Hasan', ĉevalon! Ek! ĉevalon!«

Fine la triaj jam ekpafis;
Kaj nun Hasan', ol hund' pli vigla,
Al turk' ĉevalon ĵus proponis.
L' agao jam ekrajdi pretis,
Sed fulmobat' el nub' ektondris,
Kaj lin pafaĵo fajra teren ĵetis:
La nokt' forkaŝis, kiu lin mort-trafis,
Sed Mirko el proksim' pafile pafis . . .
Tra nigra nokt' sen korp' ekflugis sola 1060
L' anim' kuraĝa, nuda, senkonsola! . . .

L' agao falis, turkoj plu batalas,
Nur nokt' forkaŝas, kiajn heroaĵojn
Ĉi tie oni batalante faras.

Nenion oni vidas pro mallumo;
Kaj kiam fulm' ekbrilas deĉiele,
Aŭ el pafilo de l' kunul' fidinda,
La kruc' kaj turko ofte je distanco
De l' akra tranĉileg' vundpikas,
Dum ili kredis: pafdistanc' disigas. 1070
Per feraj manoj ili ĉirkaŭprenas
Kaj kisas sin per fera pint' mortsema
La kruc' kaj la profet' ĝismorte. Tia
Malam' senfina en anim' ilia!

En vesto de la nokto nigra
Senkora mort' en sango kampe dronas;
Kaj ĝia okulkavo fulmobrilas,
Dum tra la ostoj vent' malvarma siblas;
Ĝi per terura tondrovoĉ' ĝojkrias
Jen nun »ho ve!«, jen simple »medet, medet!« 1080

*Jen »helpu, ho Jezuo mildakora!«
Spirĝemas ĝi, kaj siblas, kaj stertoras,
Aŭ jen, jam krucojn, jen, jam turkojn kaptas,
Kaj la viktimokulojn veste kovras.*

*Tie l' skribisto de l' agao falis,
Hasan', Omero kaj Jaŝar' danĝera
Kaj la trideko de aliaj turkoj.
Dum Baŭkon savis la senluma nokto
Kun kelk aliaj, kiuj ankaŭ fuĝis.*

*Sed kiu trovis ĉe l' agao lokon, 1090
Kaj al mortint' rikanas pro provoko?
Novica; lin Hasan' kolera trafis,
Kiam li provis al leon' salt-veni,
Kaj ektranĉinte, kapon lian preni.*

*Nun hajl' mortiga el paftuboj cedis
Al ĉielhajlo, kiu ekimpetis:
La noktorot' eniris sub tendaron.
Hororas nokt' per sango saturita,
Nigra, sen lum'; feliĉosent' nun ravas
La roton, kiu jam dormejon havas. 1100*

FATALO

*La monto Lovĉen al ĉiel' leviĝas,
Al ĝi proksime vasta kamp' troviĝas.
En kamp' loĝdomo estas de ermito,
Kaj en la domo nura ĉambro eta.
En ĉambro stranga mirindaĵ' videblas:
Al kruc' kliniĝas turko kolerega.*

*Bele vestita turko staras tie
Kaj sub la ĉalmo kaj kun tranĉa sabro,
Kaj kun pafil' kaj akra tranĉilego:
Vin kaptas tim', morttranĉos li rabie.* 1110

*Sed timon for, kunfrato mia kara,
La milda turk' morttranĉi vin ne povas;
Sen pen' timigas oni ĉi humilon.
Alfrapu nur piede teran grundon.
Ambaŭ manojn krucas li humile,
La manojn krucas, klinas prete l' kapon,
La dekstran manon al vizaĝ' direktas,
Kaj fine l' mano super frunt' flug-pendas.*

*Kaj nun alpaŝu kaj divenu, fraĉjo,
Kies, do, estas, ĉi fiera ĉalmo?* 1120
*»La ĉalmo estas de agao Ĉengiĉ,
Sed nun ĝi triste kapon ĉirkaŭprenas.«*

*Kaj tiu kap' al kiu apartenas?
»Ĝi estas kapo de agao Ĉengiĉ,
Sed ĝi per sombraj du okuloj gapas.«
Kaj kies estas borderita sabro?
»La sabro estas de agao Ĉengiĉ,
Sed ĝi nun triste koksoflanke pendas.«
Kaj kies estas la armil' orita?
»Armilo estas de agao Ĉengiĉ,
Sed nun ĉezone plenkvieste rustas.«
Kaj kies estas tiu ora vesto?
»La vesto estas de agao Ĉengiĉ,
Sed ĝi en sun', mizera, ne rebrilas.«*

1130